# Esperanto en Uralo
# Nomoj kaj faktoj




## Parto I

## Decembro 2020

**Kompilinto: Vladimir Opletajev**

**Surguto**

**surborde@mail.ru**

Estimataj uralregionaj geamikoj!

La ideo pri la kolektado de historiaj materialoj pri la esperantista movado en Uralo ne estas nova, ĝi cirkulas jam dum pluraj jaroj sed ĉiam restas en la kategorio de dezirataj intencoj. Unuaj informoj kaj faktoj pri la agado de uralaj esperantistoj revenas al la periodo, kiam aktivis Esperanto-pioniroj komence de la 20a jarcento, kaj al la 20aj jaroj de la pasinta jarcento, kiam Esperanto furoris en la ŝtato de Sovetoj, kaj la tutlandan movadon gvidis SEU. Sed evidentiĝis, ke eĉ pli postaj eventoj de antaŭ nur kvindeko da jaroj estas rapide forgesataj same kiel nomoj de tiuj, kiuj revigligis la esperantistan vivon post la jaro 1957.

Septembre de 2020 mi lanĉis la kolektadon de datumoj por krei bazon por historia dokumentaro, kiu povus fidinde prezenti diakrone la regionan esperantistan movadon.

Celo de la projekto: kolektive verki, kolekti kaj sistemigi materialojn pri la historio de la esperantista movado en Uralo.

Urala regiono: ni konsideru Uralo la nunan administran Uralan Federacian regionon en la limoj de Sverdlovska provinco, Ĉelabinska provinco, Tjumena provinco, Kurgana provinco, Ĥanta-Mansa aŭtonoma distrikto – Ugrujo, Jamal-Nenca aŭtonoma distrikto.

Materialoj: estas akceptataj ĉiuj materialoj, rilataj al la aktivado de esperantistoj en Uralo: interesaj faktoj pri la agado kaj funkciado de esperantistaj kluboj kaj societoj, statistikoj, informoj pri gravaj okazigitaj Esperantaj

renkontiĝoj, tendaroj, klubkunvenoj ktp., informoj pri la vivo kaj agado de apartaj esperantistoj.

Unueca formo de la dokumentoj: la jaro estas la sola markilo, kiu estas konsiderata por la ordigado de dosieroj t.e. kalendara sed ne laŭurba / geografia principo. La kolekto konsistas el artikoloj, biografioj de esperantistoj kaj ankaŭ el jarŝildoj, kiuj respegulas kurte kaj frapfraze politikajn kaj sociajn realaĵojn, spertitajn de esperantistoj en diversaj historiaj etapoj de nia lando.

Nun vi povas legi la unuan PDF-albumon "Esperanto en Uralo. Nomoj ka faktoj" (Parto 1). Mi tre dankas por la aktiva kunlaborado en septembro – decembro 2020 al Raja Kudrjavceva (Jekaterinburgo), Ludmila Novikova (Moskvo), Sergej Straŝnenko (Rigo), Aleksandr Korĵenkov (Kaliningrado), Nadeĵda Ŝeveljova (Tjumeno), Pavel Veselov (Tjumeno), Dilara Gadirova (Tobolsko).

La dua PDF-albumo estos publikigita en januaro 2021, kaj ankaŭ ĝi disponigos al vi multajn atentindajn artikolojn.

Karaj samregionaj esperantistoj nunaj kaj eksaj, interesaj temoj, gravaj faktoj el la pasinteco multas kaj atendas vian diligentan vortumadon kaj sistemigadon. Verku artikolojn, sendu viajn biografiojn, ne restu marĝenaj indiferentuloj. Ankaŭ viaj komentoj, korektoj, kritikoj pri la afiŝitaj materialoj estas atendataj.

Kunlabore,

Vladimir Opletajev

# 1925

**La 30an de decembro 1922 estis fondita USSR (Soveta Unio). Soveta Rusio fariĝis ĝia ĉefa integra parto, kaj la XIIa Tutrusia kongreso de Sovetoj konfirmis en marto de 1925 la Konstitucion de Rusia Soveta Federacia Socialisma Respubliko, en kiu estis proklamita la fina celo – konstruado de Komunismo.**



# 1925

## Tjumeno

### Unua tjumena esperantista societo

En la jaro 1925 fondiĝis esperantista societo, kies iniciatinto kaj multjara gvidanto estis Georgij Nikolajeviĉ Besedniĥ, diplomita juristo, kiu studis juron en Petrograda universitato, estis en la urbo konata persono, juristo de Tjumena ŝipkompanio. La statuto de la societo estis konfirmita de la gubernia ekzekutiva komitato. Konforme al la statuto la societo unuavice celis aplikadon de Esperanto por informado de eksterlandaj korespondantoj pri la konstruado de nova vivo en Soveta Unioj kaj grandaj atingoj de la sovetia popolo sur diversaj kampoj de la socia kaj ekonomia vivo. La kunvenojn vizitis ĉirkaŭ 40 plenkreskuloj, plejparte ili estis gekolegoj de la klubgvidanto. La klubsidejo ĉe Irkutskaja strato 17 troviĝis en malnova ligna dometo, kies korta enirpordego estis dekorita per la oficiala sovetia esperantista emblemo – ruĝa cirklo, en la mezo de kiu videblis verda stelo kun la orlitera siglo SEU. G.N. Besedniĥ gvidis kursojn de Esperanto, en la klubo estis okazigataj literaturaj vesperoj, diverstemaj diskutoj. La societo ĉesigis sian agadon en la jaroj de la persekutado de esperantistoj en Soveta Unio. G.N. Besedniĥ pasigis la lastajn jarojn de sia vivo en Sverdlovsko.

*Vladimir Opletajev*






# 1926

**En Soveta Unio estis okazigita la unua popolcenso de USSR, kies loĝantaro nombris 147 milionojn da homoj, inter ili la urbaj loĝantoj konsistigis 18%, la kamparanoj – 82%.**

**Kadre de la grandioza plano por la elektrizado de Rusio en decembro estis inaŭgurita la unua sovetia hidroelektrocentralo en Volĥovo (Leningrada provinco).**






# 1926

## Tjumeno

### 07. 11. 1926 Tjumenaj esperantistoj manifestaciis kun Esperanta slogano

Plejparto de esperantistoj en la postrevoluciaj jaroj estis politike engaĝitaj homoj lojalaj al la komunista ŝtato. Proletaj esperantistoj de Tjumeno partoprenis en la festa manifestacio la 7an de novembro 1926 en la kolumno de Tjumena agrikultura teknikumo kun la slogano, skribita en Esperanto, “Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!” Nikolaj Kuznecov estis tre konscia kaj aktiva membro de Komsomolo, plejverŝajne li mem iniciatis pretigon de la slogano en Esperanto kaj mem fiere portis ĝin en la vico de samideanoj. Unuafoje informo pri ĉi tiu fakto estis menciita en la artikolo de Rostislav Sokolovskij “Ankoraŭfoje pri Esperanto”, rubriko “Respondo al legantoj”, en la ĵurnalo “Tjumenskaja pravda” la 20an de oktobro 1967.



# 1968

**La 21an de aŭgusto komenciĝis la operaco "Danubo" de la milita Varsovia bloko (USSR, GDR, Bulgario, Hungario, Pollando) kontraŭ Ĉeĥoslovakio, kies nova partia gvidantaro en la periodo de la "Praga printempo" alcelis liberalajn reformojn. Danke al la "internacia helpo" la reformisma movado estis sufokita. La sovetiaj tankoj forlasis Pragon post unu monato.**

**Komsomolo – junkomunista sovetia organizaĵo – festis sian 50-jaran jubileon.**






# 1968—1983

## Renkontiĝo Esperantista Volgo-Urala (REVU)

REVU estas regula regiona renkontiĝo de esperantistoj de Uralo kaj Volgio. Sian aperon REVU ŝuldas al Boris Kolker, kiu en majo de la jaro 1968 okazigis en la ĉefurbo de Baŝkirio Ufo la unuan interurban esperantistan renkontiĝon. La aŭtoro de la siglo REVU, kiu rezultis tre populara kaj kvazaŭ entenis la sencon de esperiga instigo, estas Viktor Laptev el Ĉelabinsko.

En la sesdekaj - sepdekaj jaroj de la pasinta jarcento la nombro de esperantistoj kaj lokaj grupoj rapide kreskis, aperis bezono pri interurbaj kontaktoj por spertinterŝanĝoj, lingvaj kaj kultur-klerigaj programoj de esperantistoj, kaj REVU, kiu kutime estis ĉiujare okazigata aŭtune kaj printempe, fariĝis neeliminebla kaj tre grava elemento de la esperantista komunumo en Uralo. En la jaroj 1968 – 1983 estis okazigitaj entute 24 REVU en 11 urboj, plejofte (sesfoje) gastigis la renkontiĝon Ufo. REVU ne havis strikte preskribitan programon, multo dependis de la fantazio, elpensemo kaj kapabloj de lokaj organizaj kolektivoj, kaj nome ĉi tiu fakto pledis por la apero de elstaraj iniciatemaj uralaj esperantistoj kaj movadaj aktivuloj. La renkontiĝo rapide populariĝis kaj ordinare kolektis multajn partoprenantojn, ekzemple, en REVU-8 (Miasso) partoprenis 40 personoj el 8 urboj, en REVU-9 (Sverdlovsko) – 63 personoj, en REVU-10 (Salavato) – 50 personoj, en REVU-11 (Miasso) – 101 personoj el 20 urboj. La lasta laŭvica REVU-24 okazis en Ĉelabinsko en 1983, ĉar poste la iniciato pri la organizado de regionaj esperantistaj renkontiĝoj transiris al la Urala Esperanto-Komitato, kiu preferis aliajn tipojn kaj nomojn de la renkontiĝoj.

*Vladimir Opletajev*

# 1968—1983

## Renkontiĝo Esperantista Volgo-Urala (REVU 1 — 24)

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| REVU – 1 | 1968 | Ufo | REVU – 13 | 1976 | Tjumeno |
| REVU – 2 | 1970 | Ĉelabinsko | REVU – 14 | 1976 | Sizranjo |
| REVU – 3 | 1970 | Ufo | REVU – 15 | 1977 | Permo |
| REVU – 4 | 1971 | Ufo | REVU – 16 | 1977 | Ĉelabinsko |
| REVU – 5 | 1972 | Ĉelabinsko | REVU – 17 | 1978 | Kujbiŝevo |
| REVU – 6 | 1972 | Sterlitamako | REVU – 18 | 1979 | Tjumeno |
| REVU – 7 | 1973 | Ufo | REVU – 19 | 1980 | Sverdlovsko |
| REVU – 8 | 1973 | Miasso | REVU – 20 | 1980 | Kujbiŝevo |
| REVU – 9 | 1974 | Sverdlovsko | REVU – 21 | 1980 | Ĉelabinsko |
| REVU – 10 | 1974 | Salavato | REVU – 22 | 1981 | Ufo |
| REVU – 11 | 1975 | Miasso | REVU – 23 | 1982 | Kujbiŝevo |
| REVU – 12 | 1975 | Ufo | REVU – 24 | 1983 | Ĉelabinsko |



*REVU-19, Sverdlovsko, majo 1980.*

*Esperantistoj el Tjumena regiono – partoprenantoj de REVU-19*

# 1972

**En Soveta Unio en majo komenciĝis nova kontraŭalkohola kampanjo (la kvara laŭvica ekde 1918).**
**La sovetia gvidanto Leonid Breĵnev starigis bonajn kontaktojn kaj interrilatojn kun la usona kaj okcidenteŭropaj ŝtatestroj, evoluis internacia kunlaborado en ĉiuj sferoj inter USSR kaj kapitalismaj landoj.**



# 1972—1973

## Tjumeno



**Unua kurso de Esperanto en Tjumeno, 1972.** Novembre de la jaro 1972 juna filologo el Dagestano Vladislav Zibenkes (1941) organizis unuan kurson de Esperanto en Tjumena universitato. Post kvindekjara paŭzo en Tjumeno denove aperis homoj, kiuj interesiĝis pri la internacia lingvo kaj deziris lerni ĝin. Ili estis studentoj de la universitato kaj de aliaj superaj lernejoj de la urbo. Dum la unuamajaj festaj tagoj de 1973 Vladislav organizis partoprenon de sufiĉe granda studenta grupo el Tjumeno en Okcident-Siberia esperantista renkontiĝo (OSER) en Omsko, kie tjumenanoj povis unuafoje kontakti bone parolantajn esperantistojn. Kiel kursgvidanto Vladislav Zibenkes ricevis subtenon de la universitata studenta sindikata komitato.

Fine de majo 1973 ĉirkaŭ dudek gekursanoj ekzameniĝis. La duan de junio 1973 al ĉiu kursfininto estis solene enmanigita oficiala atestilo, konfirmanta sukcesan finon de la baza kurso de Esperanto. Vladislav Zibenkes metis en 1972-1973 semojn en fekundan tjumenan grundon, vekinte intereson al Esperanto inter aktivaj studentoj, kiuj aŭtune de la 1973a jaro decidis fondi propran esperantistan klubon.

*Vladimir Opletajev*



ATESTO

N-ro 11

La atesto estas donita al Opletaev Vladimir Vasiljeviĉ por legitimi, ke li/ŝi/en 1973 finis la fundamentan kurson de la Internacia Lingvo Esperanto ĉe la Tjumena Ŝtata Universitato kaj plenumis la ekzamenon kun la poento „perfekto"

L. P. S.

Ekzamena komisiono:

Tjumenj, la 2 an de junio 1973

АТТЕСТАТ

№ 11

Настоящий аттестат выдан Оплетаеву Владимиру Васильевичу в том, что он в 1973 году окончил курсы международного языка эсперанто при Тюменском Государственном Университете и сдал экзамен с оценкой „отлично"


М. П.

Экзаменационная комиссия:

г. Тюмень, „2" июня 1973 г.

# 1973

**La 1973a jaro el politika kaj ekonomia vidpunktoj estis sufiĉe favora por Soveta Unio. La sovetia popolo estis realiganta planojn de la 9a jarkvino, sed la lando jam faris unuajn paŝojn al la daŭra periodo, kiun pli poste oni nomis "stagnado".**



# 1973

## Tjumeno

### Junulara esperantista klubo “Revo”

La 28an de oktobro 1973 estis fondita studenta esperantista klubo “Revo”. Dum la unua kunveno de novaj kursfinintoj, okazigita dimanĉe la 28an de oktobro 1973 en la universitata ejo ĉe la strato “Semakov”, 10 estis akceptita komuna decido pri la fondo de Tjumena junulara esperantista klubo. Por la posteno de la klubgvidanto kandidatoj ne multis, kaj kiel unua prezidanto estis unuanime elektita Aleksandr Kalaŝnikov, studento de la tria kurso de la romana-ĝermana filologio. Aleksandr somere de la sama jaro partoprenis en Uzbekio SKT-4 (Studenta konstrutaĉmento de esperantistoj), kaj li parolis Esperanton jam sufiĉe bone, havis kontaktojn kun aliurbaj esperantistoj, kaj laŭ siaj trajtoj li estis tre konvena persono kapabla ekgvidi la novan grupon: sociema, aktiva, tre fervora kaj iniciatema. En tiu komenca periodo li faris tre multon bonan kaj sukcesan por la klubo kaj evoluigo de ĝia agado. Lia universitata samgrupano Vladimir Opletajev fariĝis kluba sekretario.

*Vladimir Opletajev*



# 1973

## Miasso

## Junulara esperantista klubo “Malakita stelo”

Junulara esperantista klubo “Malakita stelo” en la sudurala urbo Miasso estis iniciatita kaj fondita en aŭgusto de 1973 de Vera Dobridina (Poliŝĉuk), kiu post la fino de Ĉelabinska politeknika instituto eklaboris en Miasso, kaj de Ludmila Novikova, studentino de pedagogia instituto en Ĉelabinsko. La unua prezidanto de la klubo fariĝis Vera Dobridina, kiu tre aktivis en tiu periodo kaj faris multon por la starigo de nova klubo. Novembre de 1973 la klubo gastigis REVU-8 kun 40 esperantistoj el 8 urboj, aktive partoprenis ĝin kaj ligiĝis partnere kun junulara esperantista grupo el Tjumeno. Jam en 1974 “Malakita stelo” okupis en la SEJM-ranglisto la 17an lokon inter 40 kluboj. Samjare la bazan kurson de Esperanto, organizitan de la klubo en Miasso, finis 40 personoj. La klubo funkciis sub aŭspicioj de la urba komitato de Komsomolo. En la jaroj 1976 – 1981 la klubo estis organizanto de la tre populara inter sovetiaj esperantistoj literatura-muzika konkurso “Liro”, kiun iniciatis, kreis, gvidis kaj direktoris Ludmila Novikova. Krome la klubo multe okupiĝis pri tradiciaj agadoj: informado kaj popularigado de Esperanto, instruado kaj kursgvidado, lingva klerigado de la klubaj membroj.



# 1973

## Miasso

## Junulara esperantista klubo “Malakita stelo”




Aŭguste de 1977 “Malakita stelo” akceptis por la memorinda OrSEJT-19 esperantistojn el trideko da urboj de Soveta Unio kaj ofertis al ili interesan originalan programon. Inter la aktivuloj de “Malakita Stelo” menciindas Koptjagina Tatjana Aleksandrovna, Fomin Aleksej (melodi-komponinto de la populara kanto “Sonĝoj”), Knjazev Aleksandr, Suĥorukiĥ Lubovj, Katajeva Ludmila (Olifirova), Moŝkina Vera, Grebenjuk Vladimir, Kalik Natalja (Sporiĥina). La klubo malaktiviĝis iom post iom en la postSEJMa periodo.

(Novembro 2020) *Ludmila Novikova*

# 1973

## Tjumeno

Novembre de 1973 tjumenaj studentoj – membroj de la esperantista klubo “Revo” unuafoje partoprenis en la regiona esperantista renkontiĝo REVU (Renkontiĝo Esperantista Volgo-Urala, REVU-8) en la urbo Miasso, konatiĝis kaj amikiĝis tie kun pluraj aktivaj esperantistoj el ĉi tiu regiono. Tre afable akceptis la novan grupon Boris Grigorjeviĉ Kolker, iniciatinto kaj kreinto de la amasa esperantista movado en Baŝkirio kaj en Uralo. En ĉi tiu jaro establiĝis tre bonaj amikaj kaj partneraj rilatoj inter “Revo” kaj la klubo “Malakita stelo” el Miasso, okazis reciprokaj vizitoj de ambaŭ kluboj.



*Vladimir Opletajev*



# 1977

**En oktobro de 1977 estis akceptita nova Konstitucio de USSR – “La Konstitucio de la evoluinta socialismo”. La sovetia popolo heroe plenumadis planojn de la 10a jarkvino (1976 – 1980).**

**La glacirompa ŝipo “Arkto” unuafoje en la historio atingis ŝipnavige la nordan poluson de nia planedo.**



# 1977

## Miasso OrSEIT—19

En 1976 konforme al la decido de la Konferenco de SEJM tradiciaj someraj esperantistaj tendaroj estis dividitaj je du memstaraj tendaroj: orienta kaj okcidenta. La unua Orienta SEJT - 19 (Orienta Sovetia Esperantista Junulara Tendaro) okazis la 01an – 10an de aŭgusto 1977 en Suda Uralo ĉe la lago Turgojako. La tendaron gastigis nova sed tre brava esperantista klubo el la urbo Miasso "Malakita stelo". La tendaron partoprenis entute 126 personoj el 31 urboj; la plej multnombraj delegacioj venis el Barnaulo (13 personoj), Omsko (11), Krasnojarsko (10), Miasso (10), Tjumeno (10).

La ĉefan tendaran programon antaŭis la tritaga paroliga periodo en formo de turista marŝo, celanta en 8 apartaj migrantaj grupoj aktivigi la parolkapablojn de novaj esperantistoj, ĉar komencantoj kun minimume dujara Esperanto-aĝo konsistigis pli ol 70% de la nombro de ĉiuj partoprenantoj. Krome la tendara etoso rezultis vere junulara pro la aktiva interveno de studentoj (44 personoj). La klubo "Malakita stelo" disponigis al OrSEJT-19 tre bonajn kondiĉojn en la Ilmena turista bazejo, kiu situas en la belega kaj pitoreska sudurala montaro, kaj lerte ekvilibrigis la programon per multaj klerigaj programeroj (Esperanto-universitato, Tradukista kurso), interesaj aranĝoj ĉe lignofajro, aktivigaj sportaj kaj distraj taskoj kaj solenaĵoj (velboatado, "Neptun-festo", Konkurso de gajaj kaj spritaj, Rida vespero, ktp.), per la neforgesebla belarta konkurso "Oriento".



# 1977
## Miasso

## OrSEIT—19




OrSEJT-19 fariĝis sukcesa kaj originala evento, restinta en la memoro de dekoj da esperantistoj; ĝi gloris ne nur la belegan Uralon sed ankaŭ la senlacan, kreeman kaj inventeman organizan teamon de OrSEJT-19 el Miasso: Ludmila Novikova – ĉefkunordiganto de la tendara programo; Vera Dobridina (Poliŝĉuk) – turismaj kaj sportaj aranĝoj, velboatado; Tatjana Koptjagina – «patrino» de la tendaro – dokumentado, sekretariaj aferoj ; Vera Moŝkina – Mastrino de la Kupra Monto ; Vladimir Grebenjuk – fotisto; Valerij Maliŝev, Anatolij Mitrofanov, Vladimir Ŝĉennikov, Lubovj Suĥorukiĥ, Natalja Kalik (Sporiĥina) – gvidantoj de turistaj grupoj.

(Oktobro 2020) *Ludmila Novikova*




# 1980

**En la tradicia aprila Tutunia komunista subotniko partoprenis ĉirkaŭ 150 milionoj da homoj.**

**En Moskvo en julio – aŭgusto trapasis la XXIIaj someraj Olimpikoj, proteste bojkotitaj de kelkdekoj da landoj pro la sovetiaj militistaj fortoj, senditaj de la Registaro en Afganion.**

**Akademiano Andrej Saĥarov estis ekzilita en la urbon Niĵnij-Novgorodo.**

**La fama rusa aktoro, poeto, bardo Vladimir Visockij mortis la 25an de julio.**






# 1980—1990

## Surguto Esperantista klubo “Mateno”

La instruado de Esperanto komenciĝis en Surguto vintre de 1979, enkadre de la esperantista rondeto de lernejanoj. En 1980 post la interkonsento kun la estraro de la Domo de kulturo “Energetik” ekfunkciis unua kurso por plenkreskuloj, kiun gvidis Vladimir Opletajev. En la jaroj 1980 – 1985 la bazan kurson de Esperanto ĉe “Energetik” finis entute 23 personoj. La kursojn gvidis Vladimir Opletajev kaj Svetlana Hasjuk, veninta en Surguton el Ukrainio. En 1977 – 1984 en la urbaj tagĵurnaloj estis entute aperigitaj 12 informaj artikoloj kaj en la sama periodo estis okazigitaj 18 prelegoj por preskaŭ 500 personoj.

La 16an de majo 1981 estis fondita esperantista rondeto ”Mateno”. La 24an de marto 1985 dum la plenkunsido estis decidite reorganizi la rondeton en samnoman esperantistan klubon, kies statuto danke al la klopodoj de Vladimir Ĉistov estis oficiale konfirmita de la urba komitato de Komsomolo. En la nova klubo aktivis Vladimir Ĉistov, Larisa Ĉistova, Ivan Kitajkin, Svetlana Hasjuk, la fratoj Vitalij kaj Nikolaj Ĵdanov, Anatolij Reŝetnikov, Sergej Korĵ. La 14an-15an de decembro 1985 surgutanoj gastigis uralajn esperantistojn por la 6a Literatura semajnfino de la Urala Esperantista Societo, dediĉita al la verkaro de István Nemere. En 1987 la esperantista klubo de Surguto okupis la trian lokon en la konkurso inter la 14 uralaj esperantistaj kolektivoj. Sed iom post iom dum sekvaj kvin jaroj la klubo malaktiviĝis pro la malfacilaj kondiĉoj, kaŭzitaj de la sociaj kaj ekonomiaj ŝanĝoj en la lando, pro la perdo de senpaga klubejo en la kulturpalaco “Energetik”. Ĝis kaj post la jarmilŝanĝo okazis nur sporadaj kunvenoj de eksaj klubanoj, kelkfoje funkciis kursetoj por lernejanoj.

*Vladimir Opletajev*

# 1982

**Komunista partio de Soveta Unio akceptis la 11an kvinjaran planon por la evoluigo de USSR (1981 – 1985), sed en ĉi tiu tempo de la 60-jariĝo de la lando de Sovetoj la kreskado de la sovetia ekonomio rimarkeble malrapidiĝis. Novembre de 1982 mortis Leonid Breĵnev, kiu gvidis la landon en la jaroj 1964 – 1982, komenciĝis periodo de maljunaj ŝtatestroj de Sovet-Unio.**






# 1982

## Tjumeno OrSEJT-24

En aŭgusto 1982 apud Tjumeno en la turista ripozejo “Piŝma” surborde de la samnoma rivero okazis OrSEJT-24 (Orienta Sovetia Esperantista Tendaro) kun la antaŭtendara paroliga periodo por 12 grupoj, gvidataj de spertaj esperantistoj kaj Esperanto-instruistoj. La tendaron partoprenis ĉirkaŭ 200 personoj el diversaj urboj de Soveta Unio. OrSEJT-24 havis tradician programon similan al tiuj de someraj SEJM-tendaroj: lingvaj kursoj, turismo, sportaj ludoj, vesperaj koncertoj, diverstemaj artaj kaj klerigaj programeroj, movadaj kunvenoj ktp. Ĉar la publiko plejparte konsistis el gejunuloj, tre popularis ankaŭ noktaj bardaj gitaraj koncertoj ĉe lignofajro. La loka prepara teamo de Tjumena esperantista klubo “Revo” kaj la tendara komitato prosperis krei bonetosan ripozon kaj utilan aktivadon de esperantistoj. Dum OrSEJT-24 malfondiĝis Laborgrupo por interkluba spertŝanĝo (LKS) (1981 – 1982) kaj estis fondita Urala Esperanto-Komitato (UEK), kies gvidantoj fariĝis Aleksandr Korĵenkov, Halina Gorecka, Andrej Peĉonkin, Aleksandr Mikiŝev.

*Vladimir Opletajev*



# 1982
## Tjumeno OrSEJT-24




*Esperantistoj de Tjumena regiono en OrSEJT-24*






# 1982

## Urala Esperanto-Komitato (1982—1988)

Urala Esperanto-Komitato estis fondita aŭguste de 1982 en Tjumeno dum OrSEJT-24 kadre de la kunveno de aktivaj esperantistoj el uralaj urboj. La Komitaton iniciatis kaj ekgvidis junaj movadaj aktivuloj Aleksandr Korĵenkov (Tjumeno), Halina Gorecka (Sverdlovsko), Andrej Peĉonkin (Sverdlovsko), Aleksandr Mikiŝev (Permo), kiuj decidis agi sendepende, ekster la burokrata ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj). Surfone de ĉiam pli evidenta krizo de la tutunia esperantista movado UEK, kvankam sur la regiona nivelo, fariĝis nova freŝa fluo viviganta la aktivadon de esperantistoj en uralaj urboj. UEK okazigis aktivulajn rendevuojn (URA, UER), universitatajn planlingvistikajn konferencojn (Permo, Sverdlovsko, Tjumeno), porkomencantajn seminariojn, funkciigis klerigan servon kaj libroservon, eldonis informleterojn de uralaj esperantistoj "Ekzakte". En sia agado ĝi imitis multajn aprobitajn spertojn de la tutmonda esperantista movado kaj ankaŭ iniciatis kaj realigis proprajn originalajn projektojn. En 1986 kun UEK kunlaboris 14 esperantistaj kluboj el 13 urboj de Uralo kaj Baŝkirio. Dum la Fonda konferenco de UES la 18an de decembro 1988 en Sverdlovsko UEK deklaris sian malfondon favore al la nova tutregiona asocio.

(Novembro 2020) *Vladimir Opletajev*

# 1988

**En USSR komenciĝis la dua (ekonomia) etapo de la perestrojko.**

**La Ortodoksa eklezio festis la miljaran datrevenon de la bapto de Rusio.**

**En la armena urbo Spitako okazis tertremo de la magnitudo 6,9, pro kiu pereis pli ol 25 miloj da homoj.**

**En marto la familia ĵazbando Oveĉkin el Irkutso faris provon perforte ekposedi la linian aviadilon TU-154 kaj direkti ĝin en eksterlandon. Dum la incidento pereis 9 personoj inkluzive de 5 teroristoj.**



# 1988

## Urala Esperantista Societo (1988—2003)

Urala Esperantista Societo (UES) estis fondita la 18an de decembro 1988 en Sverdlovsko. Ĝiaj bazaj publikaj agadceloj ne multe diferencis de tiuj de aliaj sovetiaj sociaj organizaĵoj: eduki patriotojn kaj internaciistojn, evoluigi kulturligojn kun popoloj de eksteraj landoj, sed konforme al la statutaj celoj ĝi deklaris specifan fakan emfazon al Esperanto. Dum la Fonda konferenco estis akceptita la Regularo de UES, elektitaj ĝiaj Komitato, Prezidanto (Viktor Kloĉkov, Sverdlovsko), Sekretario (Ilsija Novikova, Sverdlovsko). En januaro de 1990 UES estis registrita en Sverdlovsko laŭ leĝo de la jaro 1932. Somere de 1991 ĝi estis reregistrita konforme al la nova rusia leĝo. UES funkciis kiel memstara sendependa regiona esperantista organizaĵo ekster la oficialaj ASE, SEU, REU, en ĝi membris individuoj kaj asociitaj kolektivoj; dum pluraj jaroj ĝi sukcese direktis kaj kunordigis en la vasta Urala regiono la tutan multflankan esperantistan agadon pri la informado, instruado de Esperanto, scienca esplorado de esperantologiaj kaj lingvistikaj temoj, eldonagado, kulturklerigado de esperantistoj, organizado de diverstemaj kaj diverstipaj renkontiĝoj, kontaktoj kun alilandaj esperantistoj kaj Esperantaj asocioj.

En la jaroj 1996 – 2000 UES havis averaĝe 30 kotizantajn individuajn membrojn. En 2003 la Komitato de UES, kiu formale ne estis malfondita, ĉesigis la agadon pro la transloĝiĝo de Aleksandr Korĵenkov kaj Halina Gorecka, la ĉefaj motoroj de la Societo, al Kaliningrado (2001) kaj pro la malaktiviĝo de aliaj gviduloj. La lasta Prezidanto de UES estis Vladimir Terjoĥin el Jekaterinburgo.

(Novembro 2020) *Vladimir Opletajev*

# 2001

**En la jaro 2001 finiĝis la financa krizo de reciprokaj pagoj inter entreprenoj per la interŝanĝo de varoj.**

**En 5 regionoj de RF komenciĝis eksperimento pri la okazigo en mezaj lernejoj de la Unueca ŝtata ekzameno – novforma studfina ekzameno.**




ЕГЭ РФ

# 2001

## Tjumeno OrSEJT– 33

OrSEJT-33 (Orienta Sovetia Esperantista Tendaro) okazis la 01n – 10n de aŭgusto 2001 en la turista bazejo "Piŝma" apud Tjumeno. La Organiza prepara kaj tendara komitato estis interurba: Grigorij Arosev, Lena Katajeva, Gennadij Basov kaj ankaŭ Mansur Mamkin, kiu reprezentis Tjumenan esperantistan klubon en ĝia kriza post-perestrojka periodo. En OrSEJT-33 partoprenis 26 personoj el 11 urboj, kiuj estis dividitaj en du teamoj, kaj ambaŭ teamoj dum la tuta periodo agis rivale, efektivigante multajn kreajn taskojn. La kursojn en du paroligaj grupoj gvidis Aleksandr Kalaŝnikov kaj Vladimir Opletajev. Danke al la lerta gvidado, organiza talento, inventemo kaj kreemo de Lena Katajeva kaj Grigorij Arosev la tendara temo "Dialogo inter civilizacioj" estis traktata diversflanke, fojfoje tre neordinare kaj surprize. La tuta programo pasis sukcese kaj ĝuigis ĉiujn partoprenantojn.

(Novembro 2020) *Vladimir Opletajev*




*Murgazeto de la teamo "Kavernuloj"*

# 2003

**Komence de decembro okazis la balotado por la Ŝtata dumao de RF. La plimulton de la lokoj en la parlamento unuafoje okupis la nova politika partio "Unueca Rusio".**
**Nova etapo de ekonomiaj reformoj komenciĝis en la lando.**
**Rusio okupis la unuan lokon en la monda listo pri suicidoj.**
**Pro kelkaj terror-agoj en diversaj urboj de la lando pereis pli ol 100 personoj, pli ol 400 estis vunditaj.**

# 2003—2015

## EsPrimo




EsPrimo ("Esperantista primavero") estas printempa regiona renkontiĝo de esperantistoj el Uralo kaj Okcidenta Siberio - regionoj en la meza parto de Rusio.
EsPrimo estis iniciatita de Raja kaj Viktor Kudrjavcev. Unuafoje ĝi estis okazigita en 2003 en la malnova siberia urbo Tobolsko. La nomon de la renkontiĝo proponis redaktoro de "Rusia Esperanto-Gazeto" (REGo) Georgij Kokolija.

Ĉiuprintempe la renkontiĝon organizis apartaj kluboj aŭ organizaj teamoj de aktivuloj el diversaj urboj. Al la programo kontribuis mem partoprenantoj kaj invititaj gastoj. Junularo konsistigis grandan parton de la EsPrimo-aliĝintoj. Pro la kunlaboro de gejunuloj kaj spertuloj ĉiam kreiĝis diverstemaj, interesaj kaj enhavriĉaj programoj plenaj de klerigaj, prelegaj kaj distraj eroj.

Unu el la gravaj specifaĵoj de EsPrimo estis ĝia temaro. Ĉiu renkontiĝo havis konkretan temon, kiu trapenetris kaj ligis la tutan programon. Foje la temoj estis praktike konkretaj, iufoje ili sonis romantike kaj patose, ĉio dependis ja de organizantoj kaj de ilia deziro diskuti ŝatatan temon. EsPrim-anoj kunvenis ne nur gaje etosumi kaj turisme pasigi festajn printempajn tagojn sed ankaŭ trakti temojn aktualajn kaj interesajn. Malgraŭ la regiona karaktero de EsPrimo ĝin ĉiam volonte partoprenis gastoj el aliaj provincoj kaj urboj de Rusio kaj foje el eksterlando. Dek unu EsPrimo-jn entute partoprenis 559 esperantistoj el 5 landoj.

*Vladimir Opletajev*

# 2003—2015

## EsPrimo




*EsPrimo-9, Tjumeno, majo 2013*




*EsPrimo-11, Ĉelabinsko, majo 2015*

# 2003—2015
## EsPrimo 1—11

| Laŭvica numero | Dato | Urbo-gastiganto | Temo de la renkontiĝo | Kvanto de la parto-prenintoj (urboj) |
|---|---|---|---|---|
| EsPrimo - 1 | 1 – 3 majo 2003 | Tobolsko | Regiona agado: direktoj kaj per-spektivoj | 33 (11 urboj) |
| EsPrimo - 2 | 1 – 3 majo 2004 | Jekaterinburgo | Esperanto-movado bezonas kaj idealistojn kaj realistojn – ni laboru kune! | 64 (20 urboj) |
| EsPrimo - 3 | 29 aprilo – 1 majo 2006 | Tobolsko | Novaj esperantistoj | 56 (11 urboj) |
| EsPrimo - 4 | 29 aprilo – 1 majo 2007 | Tjumeno | Kluba laboro, interklubaj rilatoj kaj interagado | 43 (8 urboj) |
| EsPrimo - 5 | 1 – 4 majo 2008 | Jekaterinburgo | Kunagi fervore, inspire kaj kore! | 74 (24 urboj) |
| EsPrimo - 6 | 30 aprilo – 3 majo 2009 | Novosibirsko | Esperanto – lingvo EsPrim-plena | 39 (8 urboj) |
| EsPrimo - 7 | 7 – 9 majo 2011 | Tobolsko | Generacioj en la urala esperantista movado | 53 (16 urboj) |
| EsPrimo - 8 | 29 aprilo – 1 majo 2012 | Tomsko | Esperanta Universo | 21 (4 urboj) |
| EsPrimo - 9 | 2 – 4 majo 2013 | Tjumeno | Esperanto en la vivo | 57 (15 urboj) |
| EsPrimo - 10 | 1 – 3 majo 2014 | Jekaterinburgo | Kreante, verkante, legante | 61 (19 urboj) |
| EsPrimo -11 | 1 – 4 majo 2015 | Ĉeljabinsko | La vojo, kiun ni sekvas | 58 (19 urboj) |

*Vladimir Opletajev*

# 2006

**Aŭtune de 2006 en Rusio estis akceptita Ŝtata programo pri la apogo kaj helpo al transmigrantoj el eksaj sovetiaj respublikoj.**

**En aprilo estis establita Socia ĉambro de RF de la unua konsisto. Tiu ĉi publika organizaĵo efektivigas ligon de sociaj unuiĝoj de RF kun la ŝtataj organoj, defendas rajtojn kaj liberojn de la civitanoj.**



# 2006

**La paĝaro “Ural-Siberia Esperantista Movado”** https://ural-sib.org/eo estis establita en junio de la 2006-a jaro por la rapida informado de la regiona esperantistaro kaj publikigado de diversaj afiŝoj rilataj al la esperantista movado. La paĝaron prizorgas kaj administras Pavel Veselov (Tjumeno), kunlaboras lingve kaj teknike per konsiloj kaj la redaktado resp. afiŝado de tekstaj kaj fotomaterialoj Galina Terentjeva (Ĉelabinsko), Viktor Kudrjavcev (ĝis 2014), Raja Kudrjavceva (Jekaterinburgo), Vladimir Opletajev (Surguto). La hejmpaĝo de la paĝaro prezentas utilajn referencojn kaj la Regularon pri la uzado de personaj datumoj. La ruslingva parto de publikaĵoj estas malgranda, dum la Esperanta kvoto superas la nombron de du centoj da materialoj. Inter la publikaĵoj plimultas retnovaĵoj, informleteroj kaj anoncoj, sed gravan lokon okupas ankaŭ aktualaj intervjuoj kun movadaj gvidantoj kaj aktivuloj kaj rakontoj pri elstaraj esperantistoj. La ĉiumonata averaĝa nombro de vizitantoj estas 2800 personoj (2020). Plej multaj legantoj de afiŝitaj materialoj estas en Rusio, Svedio, Grandbritio, Usono, Ukrainio, Francio kaj Suda Koreio.

(Oktobro 2020)

*Vladimir Opletajev*



# 2006

## Dissendolisto de ural-siberaj esperantistoj

La interreta dissendolisto de uralaj kaj siberiaj esperantistoj ural-siberio-dl@googlegroups.com estis lanĉita en 2006 post la kolektiva decido de partoprenintoj de la regiona printempa renkontiĝo EsPrimo-3 en Tobolsko (2006). La dissendolisto, kiun administras tjumena esperantisto Pavel Veselov, funkcias ĉe googlegroups.com kaj celas la interŝanĝon de informoj, anoncoj, novaĵoj kaj la realigadon de retaj verkaj kaj klerigaj projektoj inter esperantistoj de Urala Federacia administra regiono kaj aliĝintaj samideanoj el aliaj urboj kaj landoj. La aliĝon al la dissendolisto peras Pavel Veselov, kiu akceptas aliĝpetojn. En 2020 ĉiumonate estis averaĝe afiŝataj 15 – 20 diverstemaj mesaĝoj. La nombro de la abonantoj estas entute 120, uralregionaj esperantistoj konsistigas 45% de la tuta listanaro (2020).




(Oktobro 2020) *Vladimir Opletajev*

# 2013

**La jaro 2013 estis proklamita en Rusia Federcio "La jaro de la protektado de la ĉirkaŭa medio". La poluado de riveraj kaj maraj akvoj, grundo, atmosfero, la neniigado de arbaroj per elhakado kaj incendioj, la neracia utiligado kaj reciklado de industriaj restaĵoj kaj hejmaj forĵetaĵoj en Rusio atingas ĉiam pli kaj pli katastrofajn dimensiojn.**



# 2013—2019

## Surguto

## Esperanto en la “Biblioteka nokto”

Biblioteka nokto estas tradicia kaj populara amasa soci-kultura projekto, regule okazigata en Rusio de bibliotekoj kaj klerigaj institucioj ekde 2012. En Surguto ĝi estis lanĉita en 2013, kaj ĉiujare Vladimir Opletajev prezentis al publiko informan programon pri Esperanto en la Centra urba biblioteko “A.S. Puŝkin”. La tradicio estis rompita en 2020 pro la koronvirusa kvaranteno. Dum 7 fojoj la programon pri Esperanto vizitis pli ol 200 personoj, kiuj aŭskultis prelegojn, solvis diversajn kvizajn taskojn, renkontiĝis kun esperantistoj, spektis videojn kaj filmojn, partoprenis provlecionojn. “Biblioteka nokto” rezultis tre sukcesa formo de informado pri Esperanto, ebliganta aktivigajn interagojn kaj kontaktojn kun vizitantoj de la aranĝoj.

*Vladimir Opletajev*

| | | |
|---|---|---|
| 1 | 19. 04. 2013 | “Ekkonu Esperanton!” |
| 2 | 25. 04. 2014 | “Internacia lingvo Esperanto” |
| 3 | 24. 04. 2015 | “Literaturo en Esperanto” |
| 4 | 29. 04. 2016 | “Ĉu videoj en Esperanto? Tio estas reala!” |
| 5 | 21. 04. 2017 | “Ekologio de la lingvo” |
| 6 | 21. 04. 2018 | “Ho, mia kor’!” Pri unu poemo, verkita en Esperanto” |
| 7 | 20. 04. 2019 | “Puŝkin surafiŝe” Poemoj de A.S. Puŝkin en Esperanto” |






# 2019

**La jaro 2019 estis proklamita de la Prezidento de RF Vladimir Putin "La jaro de teatro".**

**En Krasnojarsko sukcese pasis la 29-aj Tutmondaj vintraj sportaj ludoj de studentoj.**

**En Rusio komenciĝis la transigo de la tradicia analoga televido al cifereca formato.**



# 2019
## Surguto
## Instruado. Esperanto-kurso “Facetoj”





La aŭtora kurso de Esperanto “Facetoj”, verkita de Vladimir Opletajev, estis eldonita broŝurforme meze de marto 2019 en Surguto. Tio estas 110-paĝa baza dulingva gramatika kurso de Esperanto, destinita por engrupa kaj memstara lernadoj. La lernolibron konsistigas la programo de la kurso, enkonduka ĉapitro, 12 lecionoj, bloko por taksado de lingvokonoj kaj kapabloj kaj Esperanta-rusa gramatika terminaro. La tradiciforma lernilo estis unue aprobita dum movadaj kursoj. En la jaroj 2019 -2020 ĝi estis aplikata kiel baza lernolibro en surguta korespondа kurso de Esperanto, kiun sukcese finis 8 personoj.

*Vladimir Opletajev*

# Esperantistoj

**Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.** ***(Deklaracio pri Esperantismo. Akceptita de la I-a Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer la 9 -an de aŭgusto 1905)***

**Esperantisto estas persono, kiu uzadas Esperanton.** ***(NPIV)***



# Besedniĥ Georgij Nikolajeviĉ

(1894 – 1976), kozakdevena siberiano, juristo, post la fino de la jura fakultato de Petrograda universitato laboris en Tjumena ŝipkompanio. Georgij Besedniĥ konis la francan, germanan, latinan lingvojn, en postrevoluciaj jaroj instruis Esperanton al plenkreskuloj, plejparte liajn kursojn vizitis gekolegoj el la ŝipkompanio, en 1925 fondis urban esperantistan societon en Tjumeno kaj gvidis ĝin. Pro la partopreno en la esperantista movado Georgij Besedniĥ ne estis reprezalie persekutata en la tridekaj jaroj, sed li ĉesis aktivi. La lastajn vivojarojn Georgij Besedniĥ pasigis en Sverdlovsko (Jekaterinburgo). Komence de la 70aj jaroj prezidanto de la studenta klubo "Revo" el Tjumeno Alerksandr Kalaŝnikov dufoje vizitis la emeriton kaj parolis kun li. La agado de Georgij Besedniĥ por Esperanto en la 20aj jaroj de la pasinta jarcento spegulis la ĝeneralan entuziasmon kaj grandan intereson al la Internacia lingvo en la rusia postrevolucia periodo. (Novembro 2020)

*Vladimir Opletajev*



## Gadirova (Mametova) Dilara Nailjevna

(25. 11. 1953), naskiĝis en Tobolsko, studis en Tjumena universitato, instruistino de la angla lingvo, emeritino, esperantistiĝis en 1974 en Tjumeno (kursgvidanto: Kalaŝnikov Aleksandr Petroviĉ), individua membro de REU, Bahaa Esperanto-Ligo (BEL), loĝas en Tobolsko. En la studenta periodo Dilara Gadirova aktivis en la junulara esperantista klubo "Revo" (1974 – 1978), partoprenis multajn regionajn kaj tutlandajn esperantistajn renkontiĝojn kaj somerajn tendarojn, instruis Esperanton en Tjumeno kaj Tobolsko kaj en someraj dumaranĝaj kursoj. Nun ŝi kunlaboras kun uralaj esperantistoj. Dilara Gadirova estas aktiva membro de la bonfara urboprotekta organizaĵo "Bona volo", kiu strebas konservi malnovan arkitekturan aspekton, historiajn kaj kulturajn heredaĵojn de la urbo Tobolsko. (Oktobro 2020)



# Izosimov Vladimir Arkadjeviĉ

(09. 08. 1947 - 22. 10. 1998), inĝeniero-elektristo, esperantistiĝis en aprilo de 1976 (kursgvidanto: Marina Kazazova), samjare aliĝis al la esperantista klubo “Revo” en Tjumeno kaj aktivis en ĝi kiel estrarano kaj multjara prezidanto. En 1982 Vladimir Izosimov estris la Organizan komitaton de OrSEJT-24, sukcese okazigita apud Tjumeno. Li estis organizanto de pluraj tradiciaj klubaj esperantistaj renkontiĝoj: vintraj – “Lazura tajgo”, printempaj – “Galanto”, “ Tendareto” – somera semajnfina turista eksterurbiĝo de esperantistoj, gvidanto de movadaj kursoj de Esperanto. Aparte grava estis por la urba klubo lia gvid-agado en la malfacilaj perturbaj jaroj de la perestrojko, politika kaj ekonimia krizoj.

*Vladimir Opletajev*



# Kalaŝnikov Aleksandr Petroviĉ




(18. 02. 1954) naskiĝis en la vilaĝo Okunjovka, distrikto Omutinka de Tjumena provinco, instruisto de la germana lingvo, laboris en Tobolska pedagogia instituto, en Tjumena universitato, emerito, loĝas en vilaĝo en Tjumena provinco, esperantistiĝis en 1972 (kursgvidanto: Vladislav Zibenkes), estis unu el la fondintoj de la studenta esperantista klubo "Revo" en Tjumeno, ĝia unua prezidanto (1973 – 1976). Aleksandr Kalaŝnikov partoprenis multajn internaciajn, tutlandajn, regionajn, interurbajn esperantistajn tendarojn kaj renkontiĝojn. En la jaroj 1980 –1982 li estis edukisto en la tutsovetia pionira tendaro Arteko (Krimeo) kaj tie instruis Esperanton en grupoj de eksterlandaj infanoj. Dum pli ol 10 jaroj Aleksandr Kalaŝnikov okupiĝis pri la instruado de Esperanto al lernejanoj, estis unu el la gvidantoj de la sovetia lernejana Esperanto-movado kaj aktiva kunorganizanto de LET (Lernejana Esperanto-Tendareto)1 – 6 (1983 – 1991) kaj de la renkontiĝoj por infanoj "Primavero" 1 – 4 (1987 – 1990), en la jaroj 1989 – 1990 li gvidis la lernejanan komisionon ĉe la Estraro de SEU (Sovetrespublikara Esperantista Unio). En 1999 – 2000 Aleksandr Kalaŝnikov staĝis en Germanio kaj aktive kunlaboris kun germanaj esperantistoj pri la organizado de la internaciaj renkontiĝoj IF-15, PSI 15 – 16.

(Oktobro 2020)

# Kirina Irina Lvovna

(11.09.1965 – 14.04.2018)

ekonomikisto, sociologo, loĝis en Tjumeno – Jekaterinburgo, esperantistiĝis en 1980 en Tjumeno en la lernejana aĝo (kursgvidanto: Aleksandr Viktoroviĉ Korĵenkov), en aprilo de 1981 ŝi aliĝis al Tjumena esperantista klubo “Revo”, aktivis en ĝi en la jaroj 1981—1991 kaj plurfoje estis ĝia estrarano, partoprenis en tutlandaj sovetiaj, rusiaj kaj regionaj esperantistaj aranĝoj. En la 90-aj jaroj de la pasinta jarcento Irina Kirina estis sekretario de la Rusia sekcio de TEĴA (Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio).



*Vladimir Opletajev*

# Kudrjavceva (Jafasova) Rafija Junusovna



(20. 06. 1959) naskiĝis en Uzbekio, finis Samarkandan medicinan instituton kaj laboris kiel infana kuracisto, esperantistiĝis en 1981, fininte la bazan kurson de Esperanto ĉe Samarkanda ŝtata universitato (kursgvidantoj: Lemelev Vladimir Romanoviĉ, Ionesov Anatolij Ivanoviĉ). En 1981- 1987 jaroj ŝi estis sekretario de Samarkanda Esperanto-klubo, kunfondinto de la "Muzeo de Paco", en 1982-1986 kunorganizanto de UZERoj (Uzbekia Esperanto-Renkontiĝo), en 1982 – 1986 partoprenis studentajn sciencajn konferencojn kadre de la sekcio "Interlingvistiko kaj esperantologio" ĉe Samarkanda universitato, en 1985– ĉe Leningrada teknologia instituto, estis aktiva partoprenanto de multaj tutsovetiaj kaj regionaj esperantistaj tendaroj kaj renkontiĝoj.

## Kudrjavceva (Jafasova) Rafija Junusovna

Ekde 1995 Raja (Rafija) Kudrjavceva loĝas en Jekaterinburgo, dum multaj jaroj laboras en la urba Domo de Paco kaj Amikeco kiel administranto. En la jaroj 2000 – 2009 ŝi redaktis la revuon “Komencanto” kune kun la edzo-esperantisto Viktor Kudrjavcev. En 2006 ili ambaŭ estis invititaj prezenti la revuon “Komencanto” al la 92-a Japana Esperanto-kongreso en Jokohama. Dum multaj jaroj ŝi membras en REU kaj estis ĝia estrarano pri la regiona agado en 2005 – 2006, 2010 – 2011; en la jaroj 2003 – 2015 ŝi estis ĉeforganizanto kaj kunorganizanto de regionaj printempaj renkontiĝoj de esperantistoj en Uralo “EsPrimo 1-7, 9-11”; iniciatinto kaj organizanto de “Lingva Trejnado 1-4” (diversnivela Esperanto-studado) en Jekaterinburgo kaj interurbaj Esperanto-renkontiĝoj en Uralo en la jaroj 2003 – 2020. En la jaro 2012 Raja Kudrjavceva sukcese trapasis la C3-nivelan lingvoekzamenon (KER) ORIGO. En 2017 ŝi estis proklamita de la Estraro de REU “Esperantisto de la jaro 2017 en Rusio”. Raja Kudrjavceva partoprenis en multaj sovetiaj, rusiaj kaj regionaj esperantistaj aranĝoj, en kelkaj Universalaj Kongresoj de Esperanto, daŭre aktivas en la regiona skalo, gvidante multajn klerigajn projektojn. (Oktobro 2020)

# Kudrjavcev Viktor Vasiljeviĉ




(08. 10. 1967 – 01. 04. 2014) inĝeniero-elektristo, studis en Ĉelabinska politeknika instituto, esperantistiĝis en 1976 en Ĉelabinsko (kursgvidanto: Viktor Viktoroviĉ Laptev), ekde 1986 loĝis en Jekaterinburgo, partoprenis en la urba, regiona kaj landa esperantistaj movadoj, estis membro de REU, UEA, estrarano de REU en 2002 – 2005, ekde 1988 ĝis 2001 aktivis en la Urala Esperantista Societo, plenumis taskojn de ĝia komitatano kaj prezidanto. En 2003 li iniciatis novformatan ural-siberian esperantistan renkontiĝon EsPrimo (Esperantista primavero). En la jaroj 1982 - 2012 Viktor Kudrjavcev gvidis korespondan bazan kurson de Esperanto, por kiu kreis kaj eldonis proprajn instrumaterialojn, multe kaj aktive informadis pri Esperanto en la enlanda gazetaro kaj en 2012 mem sukcese trapasis la C3-nivelan lingvoekzamenon (KER) ORIGO. En la jaroj 1992 – 2009 li kune kun la edzino Rafija Kudrjavceva eldonadis la internacian revuon por komencantaj aŭtoroj kaj esperantistoj "Komencanto". Tre sukcese funkciis liaj retaj projektoj: "Koresponda Servo Universala" kaj la paĝaro "Esperanto plus", li estis unu el la fondintoj de la regiona paĝaro "Ural-Siberia Esperantista Movado". La nomo de Viktor Kudrjavcev estas en la panteono de eminentaj instruistoj ĉe Edukado.net

(Oktobro 2020) *Vladimir Opletajev*

# Kuznecov Nikolaj Ivanoviĉ

(27. 07. 1911 – 09. 03. 1944) speciala sekreta agento de OGPU NKVD, milita skolto, partizano, Heroo de Soveta Unio, esperantistiĝis en 1925 en la urbeto Talico (kursgvidanto: instruisto de meza lernejo Sergej Aleksandroviĉ Suetin). En 1926 Nikolaj Kuznecov studis en Tjumeno en la agronomia fakultato de la agrikultura teknikumo kaj aktivis en la urba societo de esperantistoj. Li parolis en Esperanto senĝene, estis lingva helpanto de la kursestro G.N. Besedniĥ, interesiĝis pri literaturo, tradukis en Esperanton la poemon de M. Lermontov "Borodino". En Tjumeno Nikolaj Kuznecov fariĝis membro de SEU. Faktoj pri liaj kontaktoj kun esperantistoj post la forveturo el Tjumeno kaj pli poste dum la Granda Patrolanda milito ne estas konataj.






*Vladimir Opletajev*

*Monumento al N.I. Kuznecov - Heroo de Soveta Unio, esperantisto , Tjumeno.*

# Laptev Viktor Viktoroviĉ

(25. 10. 1940) naskiĝis kaj loĝas en Ĉelabinsko, inĝeniero-elektromekanikisto, esperantistiĝis en Ĉelabinsko en 1969 (kursgvidanto: Vladislav Grigorjeviĉ Andrejev). Post la baza kurso li aliĝis al Ĉelabinska Esperanto-klubo kaj estis ĝia aktiva multjara membro: mem instruis Esperanton, kunorganizis kelkajn REVU (Renkontiĝo Esperantista Volgo -Urala ) dum 1970 – 1980. Viktor Laptev en 1974 – 1976 estis SEJM-komitatano, vicprezidanto respondeca pri faka agado. En la jaroj 1973 – 2012 li partoprenis multajn regionajn kaj tutlandajn Esperanto-renkontiĝojn, en 2015 estis kunorganizanto de la regiona renkontiĝo de uralaj esperantistoj "EsPrimo-11" en Ĉelabinsko. Li interesiĝas pri multaj kulturaj kaj lingvistikaj temoj, verkas poeziaĵojn en Esperanto, kreis Esperanto-rimaron, kiun prezentis dum la renkontiĝo de esperantistoj, dediĉita al la 125-jara jubileo de Esperanto, junie de 2012 en Jekaterinburgo kaj dum "EsPrimo-11".



(Oktobro 2020)

*Raja Kudrjavceva*

# Novikova Ludmila Leonidovna



(04. 03. 1953) instruistino de la rusa lingvo kaj literaturo, esperantistiĝis en 1972 en Ĉelabinsko (kursgvidanto: Vladislav Grigorjeviĉ Andrejev), membro de REU, iniciatinto kaj fondinto (kune kun Dobridina Vera Nikolajevna) de la esperantista klubo "Malakita stelo" (1973) en Miasso, ĝis la 80aj jaroj aktive partoprenis en la esperantista movado de Uralo, iniciatis kaj gvidis popularan literaturan-muzikan konkurson "Liro" (1976 – 1981), organizis OrSEJT-19 (1977). Ekde 1979 loĝas en Moskvo. Ludmila Novikova estas Esperanta poetino, kiu verkas kaj tradukas beletraĵojn, poemojn, popularigas pere de Esperanto la verkaron de rusaj poetoj: A. Puŝkin, M. Lermontov, P. Jerŝov, S. Jesenin, M. Cvetajeva, K. Balmont, B. Pasternak, A. Blok, A. Aĥmatova, O. Mandelŝtam, N. Turoverov, B. Aĥmadulina, N. Rubcov k.a. Ŝiaj originalaj verkoj kaj tradukaĵoj estas publikigitaj en la Esperantaj periodaĵoj "Moskvaj novaĵoj" (Esperanta suplemento), "Cerbe kaj kore", "REGo", "Scienco kaj Kulturo", "Beletra almanako", "La Ondo de Esperanto", "Ponto" kaj aperis en la almanakoj, prozaj kaj poemaj kolektoj "Impeto" (1989), "Oraj kantoj" (2005), "Moskvaj sonoriloj" (2007), "De nenie kun amo" (2011), "Okcitanaj kantoj en Esperanto" (2011), "Hunda koro. Fatalaj ovoj" (2012), "Uralskij sledopit" (2015), "Mi venis al la mond' por vidi Sunon" (2018). (Oktobro 2020)

# Opletajev Vladimir Vasiljeviĉ


(14. 01. 1954) naskiĝis en Surguta distrikto, loĝas en Surguto, mezlerneja instruisto de la germana lingvo, Merita instruisto de Ĥanta-Mansa aŭtonoma distrikto-Ugrujo, Honora laborulo de edukado kaj sciencoj de RF, esperantistiĝis en novembro 1972 en Tjumeno (kursgvidanto: Vladislav Zibenkes), aktivas en la regiona skalo, aŭtoro de la libroj "Simboloj de Rusio (2015), "Jaroj post jaroj" (2016), "Postkursa legaĵo" (2017), "Facetoj. Baza kurso de Esperanto" (2019), bitartikolaro "Mi instruas Esperanton" (2020). Vladimir Opletajev estas individua membro de REU kaj UEA, gvidas baznivelajn kaj progresigajn ĉeestajn, dumaranĝajn kaj korespondajn movadajn kursojn, okupiĝas pri instru-metodikaj temoj, verkas por la dissendolisto de ural-siberiaj esperantistoj, la paĝaro "Ural-Siberia Esperantista Movado" kaj la bulteno de REU "Ponto". En la jaro 2012 li sukcese trapasis la C3-nivelan lingvoekzamenon (KER) ORIGO, ekde 2013 administras la grupon "Esperanto en Surguto" en la socia reto "V Kontakte", kadre de kiu realigas multajn individuajn kreajn projektojn, ligitajn kun la instruado de Esperanto, literatura verkado kaj redaktado. En la jaroj 2017 – 2019 li estis membro de la Estraro de REU. La Estraro de REU proklamis lin "Eminenta Esperanto-instruisto de la jaro 2020". (Novembro 2020)



**Ŝeveljova Nadeĵda Ivanovna** (26. 11. 1957) bibliotekisto, masaĝistino, emeritino, loĝas en Tjumeno, esperantistiĝis en 1975 post la fino de la baza kurso de Esperanto en la kulturpalaco de fervojistoj (kursgvidanto: Kalaŝnikov Aleksandr Petroviĉ), en 1976 fariĝis membro de la esperantista klubo "Revo" kaj aktivis en ĝi en la jaroj 1976 – 1995. Nadeĵda Ŝeveljova plenumis diversajn taskojn: kluba bibliotekistino, sekretario, estrarano kaj prezidanto, ŝi aktive partoprenis en la kluba vivo, multe vojaĝis kun esperantistoj tra la lando, vizitis somerajn esperantistajn tendarojn, organizis kaj gvidis plurajn bicikladojn de tjumenaj esperantistoj (1984—1989), multajn klubkunvenojn kaj tradiciajn klubajn aranĝojn. (Oktobro 2020)



**Roĵdestvenskij Vjaĉeslav Aleksandroviĉ**



(02. 05. 1941) naskiĝis kaj loĝas en Ĉelabinsko, ĵurnalisto, emerito, verkisto, poeto, esperantistiĝis en 1959 (kursgvidanto: Boris Fjodoroviĉ Sokolov) sed fakte lernis Esperanton aŭtodidakte, komencis kontakti aliurbajn esperantistojn kaj partopreni esperantistajn renkontiĝojn en 1979, aktive prelegis, verkis kaj publikigis multajn informajn artikolojn pri Esperanto. En la jaroj 1980 – 1988 Vjaĉeslav Roĵdestvenskij sukcese gvidis ĉe la urba Domo de pioniroj en Ĉelabinsko la lernejanan esperantistan klubon "Stelo de l' Espero" kaj kunlaboris kun Aleksandr Kalaŝnikov pri la organizado de tutlandaj LEToj (Lernejana Esperanto-Tendareto). En 1994 li tradukis el Esperanto kaj publikigis en la regiona tagĵurnalo "Hronika" la romanon "Sep vangofrapoj" de la hungara verkisto Károly Aszlányi. Vjaĉeslav Roĵdestvenskij partoprenis regionajn, tutlandajn kaj internaciajn renkontiĝojn kaj konferencojn i.a. Internacian kontraŭmilitan MEM-konferencon en Volgogrado (1986), Tutmondan konferencon de esperantistoj-ĵurnalistoj en Vilno (2009), estis unu el la kunorganizantoj de "EsPrimo-11" en Ĉelabinsko (2015). (Oktobro 2020)

# Sapoĵnikov Viktor Sergejeviĉ

(14. 03. 1952 – 04. 02. 2016) praktikis multajn laborojn kaj profesiojn, memlernanto de Esperanto, esperantistiĝis en 1980, loĝis en la urbeto Jalutorovsko en la suda parto de Tjumena provinco, partoprenis en multaj sovetiaj someraj tendaroj i.a. kiel grupgvidanto kaj en regionaj esperantistaj renkontiĝoj, en uralaj kulturaj kaj literaturaj seminarioj, semajnfinoj. En la jaroj 1980 – 2001 li aktive kunlaboris kun Urala Esperantista Societo kaj la rondo "Kulturo", publikigis artikolojn, recenzojn, humuraĵojn en "La Ondo de Esperanto", "Sezonoj". En 1990 aperis lia privata eldono de "Proverboj kaj sentencoj", en 1992 estis publikigita lia novelaro "Ljusjka Benc". En la jaro 2000 de la eldonejo "Sezonoj" en



Jekaterinburgo en la serio "Rusa literaturo" (volumo 6) estis eldonita la romano de Lev Tolstoj "Resurekto" en la traduko de Viktor Sapoĵnikov (redaktoro Aleksandr Korĵenkov). Krome li kontribuis al la antologieto "Samideanoj" (Kaliningrado, 2006).

(Oktobro 2020)

## Straŝnenko Sergej Veniaminoviĉ



(07. 03. 1956) inĝeniero pri grandkomputiloj, programisto; ekde 1979, post la Kijeva SEJT-1979, havas la pseŭdonimon Sergeo la Terura, naskiĝis en Samaro (Kujbiŝevo), ekloĝis en Tjumeno en la jaro 1967, studis en la filologia fakultato de Tjumena universitato, kiun forlasis memvole en 1975 kaj en 1984 finis la instituton de inĝenieroj de civila aviado en Rigo. Sergej Straŝnenko esperantistiĝis en 1973 en Tjumeno, memlernanto, samjare aliĝis al la junulara klubo "Revo", en kiu li aktivis en la jaroj 1973 – 1978, 1984 –1987 kiel gitaristo, kantisto, turisto, kluba estrarano. Krom en la rusa lingvo kaj Esperanto li parolas ankaŭ en la latva kaj germana lingvoj, studis latinon. Liaj edzino kaj filo ankaŭ estas esperantistoj. Li militservis (1976 – 1978), laboris en la flughaveno de Tjumeno (1984 – 1987), konstruis marŝipojn en Nikolajevo, Urkrainio (1987-1988), depost la jaro 1988 loĝas en Rigo. Post plurjara paŭzo en 2007 Sergej Straŝnenko revenis al aktiva esperantista agado: dum multaj jaroj li kunlaboras kun Mikaelo Bronŝtejn, rezulte aperis tri komunaj kantodiskoj (2013, 2015, 2020), koncertas duope kun Mikaelo kaj sole, i.a. en multaj rusiaj (TEMoj, APERo, MER) kaj eksterlandaj (BET, UK) aranĝoj. Li estas aŭtoro de la sciencpopulara libro "Informo" (Moskvo, Impeto, 2015), kiu estas tradukita en la rusan lingvon. (Oktobro 2020)

# Ŝuvajev Timofej Dmitrijeviĉ

(10. 06. 1915 – 14. 05. 2001) naskiĝis en Stavropola regiono, ekde 1959 loĝis en la siberia vilaĝo Larjako kaj poste en Niĵnevartovsko, veterano de la Granda Patrolanda



milito, ordenito, instruisto de historio, direktoro de meza lernejo, fondinto de la urba regionografia muzeo (1972), aŭtoro de la regionesplora verko "Niĵnevartovsk". En marto 1996 la urbo honoris lin per la titolo "Honora civitano de Niĵnevartovsko". Post la morto de Timofej Ŝuvajev la urba muzeo ekde junio 2001 portas lian nomon.

Timofej Ŝuvajev, laŭ rememoroj de la filinoj, lernis Esperanton memstare en la 30aj jaroj antaŭ la Dua mondmilito, estis membro de SEU, SAT. Pri la lingvo lin atentigis la fama sovetia sciencisto kaj selektisto Ivan Miĉurin. En la 80aj jaroj de la pasinta jarcento Timofej Ŝuvajev gvidis kursojn de Esperanto, fondis kaj estris la klubon de internacia amikeco "Samotloro" en Niĵnevartovsko, kontaktis kaj vizitis surgutajn esperantistojn, partoprenis en Tjumeno en OrSEJT-24 (1982), multe korespondis, preparis por muzeaj eksponaĵoj klarigajn etikedojn en la rusa, angla lingvoj kaj en Esperanto, okazigis urbajn ekspoziciojn pri Esperanto, aktive verkis por "Informa bulteno de ASE.
(Oktobro 2020)

*Vladimir Opletajev*

# Terjoĥin Vladimir Aleksandroviĉ



(19. 04. 1935) naskiĝis en la vilaĝo Viŝenka de Uljanovska provinco, inĝeniero pri energio kaj psikologo, loĝas en Jekaterinburgo, esperantistiĝis en 1964 en Novosibirsko (kursgvidanto: Vereŝĉagina Varvara Ivanovna). La unua Esperanto-aranĝo, kiun li partoprenis post la lernado de la lingvo estis somera tendaro apud Taŝkento en 1965. Post la 1966-a jaro li partoprenis multajn siberiajn interurbajn renkontiĝojn de esperantistoj en Barnaulo, Novosibirsko kaj Meĵdureĉensko. En 1971 Vladimir Terjoĥin mem iniciatis kaj sukcese organizis la 2-n Esperantistan studentan konstrutaĉmenton en Novosibirska provinco. Li partoprenis multajn interurbajn, regionajn, tutlandajn renkontiĝojn kaj REU- kongresojn, Vladimir Terjoĥin estis partoprenanto ankaŭ de kelkaj UKoj. En 2012 li sukcese trapasis KER-ekzamenon je la nivelo A2 en Jekaterinburgo. Dum multaj jaroj li aktivis en la Urala Esperantista Societo, estis ĝia prezidanto.

(Oktobro 2020) *Raja Kudrjavceva*

# Veselov Pavel Vitaljeviĉ

(04. 09. 1980) naskiĝis en Kurgano, sistema administanto, fakulo pri programado kaj komputiko, loĝas en Tjumeno, esperantistiĝis en 1996 en Tjumeno (kursgvidanto: Izosimov Vladimir Arkadjeviĉ). Pavel Veselov estras la urban esperantistan klubon en Tjumeno, li estas kunorganizanto aŭ gvidanto de multaj Esperantaj projektoj en Uralo, i.a. "EOLA-17" en Jekaterinburgo (2005), "EsPrimo-4" (2014), "EsPrimo-9" (2013), konstanta teknika apoganto de regionaj esperantistaj renkontiĝoj kaj interurbaj Esperanto-aranĝoj en Jekaterinburgo kaj Tjumeno, de multaj interretaj aktivaĵoj: konkursoj, leterverkoj, komentarioj ktp. Depost 2006 Pavel Veselov prizorgas kaj administras la paĝaron "Ural-Siberia Esperantista Movado" kaj la dissendoliston de ural-siberiaj esperantistoj.



(Oktobro 2020)